

# Muŝflugilo



2023-03-10

EO: Karaj legantoj - En ĉi tiu refoje malfrua numero de Muŝflugilo la enhavo buntas: Sociaj retoj, novaĵo pri esperantisto, algoritmoj... bonan legadon!

PT: *Queridos leitores - Neste número novamente tardio do Muŝflugilo o conteúdo é variado: Redes sociais, notícias sobre um esperantista, algoritmos... boa leitura!*

## ALTERNATIVAJ SOCIRETOJ

Se vi ofte aktive partoprenas je sociretaj medioj, sed ne aparte al vi plaĉas la komercsinteno de tiuj medioj per uzado de viaj privataj datenoj kiel monunuon, do endas esplori alternativajn sociretojn.

Por pepuloj, ĉu *Mastodon* ĉu *Pleroma* estas konataj sociretoj por mikroblogo, similaj al *Twitter*. Se kelkaj frazoj ne sufiĉas, vi povas elverŝi vian verkemon per blogretoj *WriteFreely* kaj *Plume* anstataŭ *Blogger*. Por videamantoj estas *PeerTube* kaj por sono *FunkWhale*. Se fotoj sufiĉas, jen *Pixelfed*. Por ĝenerala sociretumado *diaspora\**, *Friendica* kaj *Hubzilla* estas la plej konataj alternativoj al *Facebook*.

Ĉiuj ĉi estas pli malpli interkonektitaj, tiel ke eblas pepi per *Pleroma* kaj tiun pepon legi ĉe *Friendica*; kvankam ne tiom sencus ricevi mesaĝon de *Pixelfed* ĉe *FunkWhale*. Ĉiuj estas ankaŭ retoj de pluraj individuaj serviloj: via [konto@esperanto.masto.host](mailto:konto@esperanto.masto.host) povas esti sekvata de homoj kies kontoj estas [@pleroma.social](https://www.instagram.com/pleroma.social) — simile al funkciado de retpoŝto. Kaj tiel ĉiuj permesas ke vi mem starigu vian unu-homan (aŭ familian, grupetan, ...) servilon, konektita al tiu ĉi granda komunumo, nomata Federaciinta Universo.

Nuno Magalhães

## ĜISDATIGO PRI NOIĈJO SEKVOJO

En Januaro, la Kazacia Kortumo de Kalifornio anoncis sian decidon pri la kazo de samideano Noiĉjo Sekvojo<sup>1</sup>, kiu estis kondamnita al mortopuno antaŭ pli ol tridek jaroj<sup>2</sup>. La kortumo komplete nuligis la rezultojn de lia proceso, kaj sekve la juĝon kontraŭ li. La Kortumo deklaris unuanime ke okazis gravaj problemoj en la proceso kontraŭ Noiĉjo, kaj nuligis la tutan proceson, inkluzive de la kondamno al mortopuno<sup>3</sup>.

Principe tiu decido estas bona novaĵo por Noiĉjo, kvankam restas multe da necerteco por li. Oni eble iniciatos novan proceson kontraŭ li, kaj eĉ la decido pri tio ne nepre okazos tre rapide. Noiĉjo nun aĝas 71 jarojn, pasigis pli ol la duono de sia vivo en prizonoj, kaj suferas pro malsanaj kaj malliberejaj kondiĉoj.

### Kiu estas Noiĉjo?

Noiĉjo Sekvojo estas Ĉeroka<sup>4</sup> Esperantisto, kiu estis tre aktiva en la sepdekaj kaj okdekaj jaroj, en Eŭropo kaj Japanio same kiel en Usono. Li naskiĝis kaj kreskiĝis en Tahlequah, Oklahomo (la ĉefurbo de Ĉerokujo) kaj lernis la ĉerokan hejme<sup>5</sup>.

Li lernis Esperanto meze de la 1970-aj jaroj. Kiel marsoldato, li multe propagandis Esperanton surŝipe dum liaj vojaĝoj, ekzemple en Aŭstralio kaj Japanio.



Noiĉjo Sekvojo en Koreujo kaj Japanujo propagandante Esperanton. (Fonto: Bulteno de Esperanto-Ligo de Norda Ameriko, Julio-Aŭgusto 1980)

Li edziĝis kun Japana Esperantistino, kun kiu li havas du gefilojn kaj tri genepojn.

En la 80-aj jaroj, lia mararmea posteno relokigis lin al Eŭropo, kaj li aktivis en la movado tie. En 1981, ekzemple, li partoprenis la kongreson de "SAT en Britujo". En 1985, li gvidis karavanon da usonaj junuloj al la Universala Kongreso (kaj IJK) en (tiam-Okcidenta) Germanujo. En Esperantujo li ofte prelegis pri Ĉerokaj kaj indiĝen-rajtaj temoj, pri kiuj li pasiis. Li estis aktiva en movadoj por indiĝenaj rajtoj, kaj celis montri la utilon de Esperanto por indiĝenoj, por havi komunan lingvon kiu ne estu la angla aŭ de alia koloniista potenco. Li iniciatis reformitan version de Esperanto (nomita 'Poliespo') kun polisintezaj trajtoj, ĉar laŭ li, tio estus pli akceptebla por indiĝenoj kun polisintezaj lingvoj<sup>6</sup>.



Noiĉjo Sekvojo (tria de maldekstre) dum la kongreso de "SAT en Britujo", 1981.

En 1986 li estis arestita en Kalifornio kaj akuzita pri krimoj, pri kiuj li ĉiam asertis sian senkulpecon. En lia defendo multaj Esperantistoj parolis al la kortumo, pri kaj eĉ per Esperanto.

Laŭ raportoj, la etoso en la kortumo estis tia, ke oni vidis lian Esperantan agadon kiel plua konfirmo de lia frenezeco. En 1991, Noiĉjo estis kondamnita al mortopuno, kaj do restas en prizono ekde tiam.

Pluraj Esperantistoj tenis kontakton kun Noiĉjo dum la jardekoj, inter aliaj Vilĉjo Harmon (tre konata usona Esperantisto), ĝis ties morto en 2019. Krome, Sennacieca Asocio Tutmonda iam kolektis monon por li, informis pri li, kaj diversaj SAT-anoj ĉirkaŭ la mondo provis sekvi lian kazon, kvankam ofte malfacilis de ekster Usono.



La filino kaj du genepoj de Nioiĉjo (maldekstre) ĉe la memorservo por Vilĉjo Harmon, 2019

Se vi volas kontribui al la subteno de S-ro Sekvojo mem (por ke li povu aĉeti helpojn al koro kaj sano— librojn, manĝaĵojn, vitaminojn, naskiĝtag-donacojn por la genepoj, ktp), vi povas kontakti lian familion ĉe:

<https://nisequovah.blogspot.com/>.

Tie vi povas ankaŭ trovi iom pli da informo pri Nioiĉjo. Vi ankaŭ povas sendi leterojn kaj vortojn de kuraĝigo al li rekte ĉe:

[N.I. Sequovah \(B. Waldon\)](#)

[P.O. Box H27800-5EY18](#)

[San Quentin State Prison](#)

[San Quentin, CA 94974](#)

**Brandon Sowers**

<sup>1</sup>Ankaŭ konita kiel "Nvwtohiyada Idehesdi (N. I. Sequovah" aŭ (en la kortumo) "Billy Waldon".

<sup>2</sup> Ne ĉiu ŝtato en Usono permesas mortopunon. Por tiuj, kiuj permesas, ĝenerale pasas jardekoj inter la kondamno kaj la ekzekuto, dum kiuj okazas diversaj apelacioj. En Kalifornio, 30 jaroj estas konsiderata "averaĝa" daŭro por la apelaciaj proceduroj.

<sup>3</sup> Pli da detaloj (en la angla) troveblas ĉe: <https://deathpenaltyinfo.org/news/california-supreme-court-grants-new-trial-in-30-year-old-death-penalty-case>

<sup>4</sup> La Ĉerokoj estas indiĝena popolo, kiu origine loĝis en la sudoriento de la nuna Usono. Inter 1830-50, la usona registaro forpelis ilin en la t.n. "Vojo de Larmoj" trans la rivero Misisipo, kaj promesis lasi ilin tie en eterna paco. Inter 1890-1907, Usono establis tie la ŝtaton Oklahomo, kaj kuraĝigis blankan setladon. Nuntempe 16% de la loĝantaro de Oklahomo estas indiĝenoj (el diversaj popoloj).

<sup>5</sup> La ĉeroka lingvo estis la unua indiĝena lingvo en Nordameriko por kiu oni kreis skribsistemon. Nuntempe ĝi kalkulas je proksimume 2000 parolantoj. La inventisto de la ĉeroka skribsistemo estis ankaŭ nomita Sequoyah (Sekvojo).

<sup>6</sup> Polisintezaj lingvoj estas lingvoj en kiuj vorto povas havi multajn morfemojn, tio estas, unuoj kun signifo sed kiuj ne rajtas formi memstarajn vortojn. Granda nombro de la indiĝenaj lingvoj en Ameriko estas polisintezaj, inkluzive de la ĉeroka.

[https://pt.wikipedia.org/wiki/L%C3%ADnqua\\_polissint%C3%A9tica](https://pt.wikipedia.org/wiki/L%C3%ADnqua_polissint%C3%A9tica)

## ALGORITMOJ KAJ PROBLEMOJ PRI ILI

Algoritmoj estas nenio magia; estas nur instrukcioj, skribitaj en preciza formo per paŝoj. Ekzemple, receptoj ankaŭ estas simpla formo de algoritmo. "(1) Plenigu kaserolon per 2 tasojn da akvo, (2) starigu ĝin sur la brulilo en kuirforno, (3) eligu fortan flamon per la brulilo, (4) atendu ĝis la akvo bolas, (5) aldonu tekuleron da salo kaj tason da rizo, (6) eligu tre malfortan flamon per lla brulilo, (7) atendu dum 18 minutoj, (8) malŝaltu la brulilon" jam estas algoritmo: sekvenco de paŝoj por atingi rezulton.

Algoritmoj povas esti uzataj de homoj, sed estas eĉ plu utilaj por komputiloj. Komputilo povas fari aĵojn por ni. Ekzemple, aŭtomata kuirejo povas kuiri por ni manĝaĵojn. Fakte, tio jam ekzistas: en multaj fabrikoj oni uzas maŝinojn por aŭtomate kombini ingrediencojn. Algoritmoj ankaŭ estas utilaj por aliaj aferoj. Ekzemple, kiam nia telefono trairas la liston de stratoj por trovi vojon de loko A al loko B, ĝi uzas algoritmon.

Sed nun oni ofte parolas pri problemoj de algoritmoj. Problemoj ja ekzistas.

La unua problemo estas, ke multaj algoritmoj estas komercaj sekretoj. Plu uzante la ekzemplon de receptoj, estas kiel la recepto de *Coca-Cola*. Ni ne povas scii, kion oni aldonas tien kaj en kiu sekvenco. Kiel vi povas scii, ĉu la recepto estas bona por vi? Fakte, neniel. Vi devas kredi la firmaon.

La dua problemo estas, ke nun multaj algoritmoj estas skribitaj de aliaj algoritmoj. Ekzemple, algoritmo povas trairi ĉiujn varojn en la superbazaro kaj mem elekti la recepton de via supo. La problemo estas: tiu algoritmo ofte estas tute malsama ol algoritmo, skribita de homoj! Povas kombini ingrediencojn tute bizaraj, kiujn homoj neniam kombinus. Ekzemple, por fari supon, la algoritmo povas decidi kombini (ekzemple) hundan manĝaĵon X, pecdon de vimena korbo kaj iomete da parfumo Y. (Tio estas nur ekzemplo!) Imagu ĉu tiel fariĝas tre bongusta supo.

Sed... tiu estas la problemo, ĉu ne? Eble la manĝado de tiuj ingrediencoj dum longa tempo havas iajn neatenditajn rezultojn? Eble la produktanto de hunda manĝaĵo ŝanĝos sian recepton, kaj la rezulto estas la sama por hundoj, sed ne por homoj?

La plej grava problemo estas, kiam tiuj du problemoj ekzistas samtempe. Algoritmo faras ion, ŝajne ofte funkcias bone, sed vi ne povas ekscii, kion ĝi faras ene. Kaj fakte neniu bone scias, ĉar estis skribita de alia algoritmo.

Laŭ mi, la problemo ne estas algoritmoj mem. La problemo estas, ke homoj senpense kredas je algoritmoj kaj ne provas (kaj ofte ne povas!) kontroli, kion kaj kiel iliaj algoritmoj faras.

**Dmitro Kuŝnaroŭ**

## VIZITOJ

De kiam aperis la lasta numero de Muŝflugilo, oportanoj vizitis amikojn en Oleiros kaj Vigo kaj planas viziti estonte la bibliotekon de Vila Nova de Famalicão. Inter la 18a kaj 25a de julio almenaŭ kvar el ili planas partopreni la ĉijaran SATkongreson en Gresiljono.

Se vi interesiĝas pri estontaj vizitoj aŭ pri kunvojaĝi al Gresiljono, skribu al la redakcio!



Xana

## Aprinda Esperanto

**Online** - [www.kurso.com.br](http://www.kurso.com.br)

**Presencialmente (Porto)** - [www.unicepe.pt](http://www.unicepe.pt)

**Redakcio:** Ana, Brandon, Dan Deli, Dmitro, Nuno, Roger kaj Xana (dume)

**Kontakto:** [esperantoporto@gmail.com](mailto:esperantoporto@gmail.com)